

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (897) • 2012 •

Verkita de nekonata aŭtoro. Esperantigis:
Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff,
*04.11.1938) en Decembro 1986 laŭ la
origina germanlingva teksto.

Jartransiĝo

*Veninta estas nun la fin'
de l' jar'; ĝi proksimigis nin
kun ĝojo kaj sufer' por ni
al la eterno iom pli.*

*La jar' forpasas en kviet',
la nova venas kun sekret'.
Ne scias la estonton ni,
sed gardas nin ja nia Di'.*

*La jaron enpaŝante, Vin,
Sinjor', ni petas: Benu ĝin!*



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 311 241 406; ✉ polnicky@quick.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Dio de Abraham kaj de Isaak kaj de Jakob – Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj	123
Sep ruĝaj soldatoj kantante eniras la ĉielon	127
Enkonduka historio (2:a parto)	130
Ne forgesu aliĝi ...	134
Akvo – viva akvo – fluanta akvo–...	135
Sankta Paŭlo bezonas komparojn kaj ... sin kompromitas	136
Testamento	137
Invito al Bibliaj tagoj kun Adoru	138
Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno	140
Informetoj	142
Letero alvenis al la sekretario	143
Pretigu serioze	144

REDAKTORAJ VORTOJ

Ekstere la neĝo jam dike kovras la teron. Denove estas vintro kaj unu jaro pasis. Denove ni atendas kaj preparas nin por la Kristnaska festo. Nia filo lernas la kristnaskajn kaj la Lucia-kantojn. Je nia granda ĝojo lia sveda lingvoscio bone evoluas post unu jaro en la sveda lernejo.

La jarfino ankaŭ igas nin pripensi kio okazis dum la jaro, ĉu laŭ niaj planoj kaj deziroj aŭ ne? La ĉi-jara jarfino ankaŭ signifas ke mi jam redaktis Dia Regnon dum ok jaroj. Mi konstatas ke la enhavo estis kaj daŭre estas varia kun multaj diversaj kontribuoj. Pro tio mi multe dankas ĉar sen tiuj kontribuoj ne estus gazeto.

Al ĉiu kontribuanto, al ĉiu leganto, kaj al ĉiu apoganto mi deziras:

**Feliĉan Kristnaskfeston kaj
Sukcesan Novan Jaron.**

Bengt Olof Åradsson

Pensoj pri liturgio aŭ:

Dio de Abraham kaj de Isaak kaj de Jakob – Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj

Prelego dum la KELI-kongreso en Zöblitz

Wolfram ROHLOFF, DE

Somere en la jaro 1988 aŭ 1989 en mia naskiĝurbo Hof/Bavario okazis renkontiĝo por amatoraj astronomoj, kiuj regule observas la sunon. Amatorastronomo el Plauen, jam tiam partnera urbo de Hof, situanta ne multe pli ol 30 km malproksime de Hof, ankaŭ volis veni. Sed tiutempe ankoraŭ ekzistis la limo inter ambaŭ germanaj ŝtatoj, la „fera kurteno“. Tial li ne rajtis vojaĝi el la GDR-a Plauen al la FRG-a Hof.

Sed li informis la organizantojn, ke li tamen partoprenos: dum la tago de la renkontiĝo, kiam la aliaj en Hof observos per siaj teleskopoj kaj aparatoj la sunon kaj ĝiajn makulojn, protuberancojn ktp., li ankaŭ observos samtempe la saman sunon kaj la samajn sunmakulojn kaj protuberancojn per sia teleskopo en Plauen. Tiumaniere ili ĉiuj per la samtempa rigardo al la sama objekto, per okuloj kaj pensoj estos ligitaj unu kun la aliaj.

....

Multaj samtempuloj, ĉu kristanaj ĉu paganaj, ne komprenas, kial kristanoj dum frua dimanĉmateno, kiam “normalaj” homoj ankoraŭ enlittumas, iras al preĝejoj por tie festi diservojn. Per ĉi tiu artikolo mi provas klarigi: Se ni festas diservon / kristanan liturgion, ni forlasas tempon kaj lokon kaj staras antaŭ la

trono de Dio. Liturgio transcendas tempon kaj lokon.

La Sadukeoj dum la vivtempo de Jesuo el Nazareto estis grava grupo en Izraelo. Tiuj ĉi uzis kaj akceptis nur la unuajn kvin librojn de la Malnova Testamento en diservoj: la Toraon. En ĝi apenaŭ troveblas indikoj al resurekto de mortintoj. Tial la Sadukeoj firme opiniis, ke resurekto de mortintoj ne ekzistas. Laŭ ili sekve ĉio finiĝas kun la morto.

Iam Sadukeoj venis diskuti kun Jesuo pri la resurekto de mortintoj. Jesuo argumentas por resurekto citante verseton el la Torao, el la dua biblia libro (Eli 3,6): “*Pri la releviĝo el la mortintoj,*



Wolfram Rohloff. Fotis Václav Pospíšil

ĉu vi ne legis tion, kio estis dirita al vi de Dio, nome: Mi estas la Dio de Abraham kaj la Dio de Isaak kaj la Dio de Jakob?” Se Dio sin mem nomas Dio de Abraham, Isaak kaj Jakob, – personoj, kiuj mortis jam antaŭ multaj jarcentoj – Jesuo konkludas: Ili nun en Dio vivas, ĉar *“Dio estas Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj.”* (Mat 22, 31s)

Tiu Dio estas Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj. Estas bazo por kompreno kaj kuncelebrado de kristana liturgio aŭ alivorte diservo: Liturgio transcendas tempon kaj vivon de la kuncelebrantoj.

“

Se vi volas jam dum via vivtempo viziti ĉielon, vizitu liturgion/diservon!

Per tri ekzemploj el arkitekturo, ortodoksa “Dia Liturgio“ kaj Apostola Kredkonfeso mi nun volas montri, ke tiu ideo estas komuna en kristana religio.

1. Mi komencu arkitekture: Niaj antaŭuloj antaŭ – ni diru – 800 jaroj bone sciis, ke viziti Diservon estas viziti Dion. La arkitekturo de gotikaj katedraloj tion klare predikas: preĝejaj kolonoj similas al trunkoj de arbegoj. Sur plafono kaj muroj videblas arbaj folioj, birdetoj kaj floroj, ĉar ... celebrante Diservon ili (kaj ni) vizitas paradizan ĝardenon kun ĝiaj arbegoj, floroj kaj faŭno. Tial tiutempe baptoj okazis aŭ antaŭ la “diodomoj“ aŭ en enireja halo, ĉar la bapto estas (re)enirbileto al la paradiza ĝardeno, el kiu Dio iam forpelis la pekemajn homojn.

2. Mi daŭrigu ortodokse: Ĝis hodiaŭ

la Dia Liturgio por la ortodoksa kristanaro senteblicas la scion: kie homoj kunvenas en la nomo de Jesuo, tie Jesuo estas meze inter ili, tie komenciĝas la ĉielo. La eklezia koruso kantas (intence) malnovtipajn kaj malmodajn melodiojn. Tiuj kantoj ofte originas el la epoko de la unuaj kristanoj. Per tiuj mal-nuntempaj kantoj la Dia Liturgio nin transportas en antikvan tempon de kristanismo, aŭ pli ĝuste: starigas nin kune kun la piuloj de la antikva tempo kaj kune kun la piuloj el ĉiuj epokoj kaj lingvoj antaŭ la tronon de Dio.

En ortodoksa preĝejo vi trovos multajn bildojn de sanktuloj aŭ de Jesuo. La tiel nomataj “ikonoj“ por kredantoj ne plu restas bildoj, sed iĝas larĝe malfermitaj fenestroj al la ĉielo, al la ĉielaj “enloĝantoj“, al Dio. Kiu vizitas Dian Liturgion en ortodoksa preĝejo, vizitas ĉielon kaj staras antaŭ la trono de Dio!

Se vi volas jam dum via vivtempo viziti ĉielon, vizitu liturgion / diservon! Tiu kompreno esence estas la (eble kelkfoje forgesita) bazo, celo kaj senco de kristanaj diservoj (kaj ne nur tro ekzotika kaj stranga ideo de mi).

3. La t.n. Apostola Kredo-Konfeso estas komuna heredaĵo de la okcident-eŭropaj eklezioj: rom-katolika, luterana, reformita ktp. En okcidenteŭropaj diservoj la kunveninta kristanaro ĝin komune kaj laŭte konfesas dum preskaŭ ĉiu diservo. Ĝia tria parto formulas: Mi kredas je “... la komunumo de la sanktuloj...” (vidu: Adoru 001.4) Tiu ĉi komunumo de la sanktuloj ne estas speciala grupo de religiaj herooj, sed la grandega aro de fideluloj el ĉiuj epokoj, lingvoj kaj landoj. Ĉiuj, kiuj dum sia vivo apartenas, apartenis, apartenos al

Dio, kune formas tiun “komunumon de sanktuloj” ili kune – alia biblia bildo – formas la korpon de Kristo. Celebrante liturgion kristanoj el ĉiuj epokoj kaj lingvoj kune formas la komunumon de la sanktuloj kaj kune starigas sin antaŭ la ĉielan tronon por adori Dion Patron kaj Filon kaj Sanktan Spiriton. Diservo / Liturgio transcendas kaj mondon kaj tempon!

Sed kiel okazas tiu transcendiĝo de loko kaj tempo? Kiel ni starigas nin antaŭ la tronon de Dio?

Mi devas nepre substreki, ke ni homoj tion NENIEL povas okazigi. Estas Dio, kiu okazigas kaj starigas nin antaŭ sian tronon, se ni kolektiĝas en lia nomo. Rememoru al la historieto pri la amator-astronomoj: Ni ĉiuj “rigardas” al la sama “suno” (Dio) kaj tiel la “suno” starigas nin unu apud la alian antaŭ sin. La kristana liturgio nur helpas konsciĝi pri tio.

Mi nun per kelkaj ekzemploj volas ilustru, kiel la liturgio konsciigas nin pri tio:

La vortoj”En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito” – tradicie kun samtempa krucosignado de la kunvenintoj – estas (almenaŭ estu!) la unuaj oficialaj, elparolitaj vortoj en diservo / liturgio. Ili proklamas lokon, tempon kaj ĉeestantaron “propraĵoj” de la Triunua Dio. Kvankam “*Li ne estas malproksime de ĉiu el ni*” (Agoj 17, 27), ja estas funda diferenco, ĉu homoj per tiuj vortoj konscie malfermas lokon, korpon, animon kaj vivon por Dio la Triunua.


Ofte la ĉeestantaro kune preĝas psalmon. Psalmoj estas preĝoj de la juda popolo kaj religio. Kristanoj, kiuj preĝas

psalmojn, uzas vortojn el alia tempo, popolo kaj religio. La psalmpreĝon ni ĉiam finas per la (kantataj) vortoj:

“*Glor’ al la Patro kaj la Fil’ kaj al la Sankta Spirit’, kiel en la komenco, tiel nun kaj plu tra la tuta temp’ kaj en etern’.* Amen”.

Tiuj vortoj konfesas, ke la Dio, kiun ni adoras, estas la sama, kiujn la juda popolo adoras, kvankam ni ne konsentas pri multo, ekzemple pri la “Triunuo” (Estas nur unu Dio, sed tiu unu Dio revelaciis sin en tri personoj: Patro, Filo, Sankta Spirito.). Tamen ni staras kun la juda popolo antaŭ la sama trono.

Pli poste sekvas la “Kyrie eleison” – voko. La romia imperiestro ordonis al la civitanoj, saluti kaj adori lin aŭ liajn statuojn per la grekaj vortoj “Kyrie eleison!”, kio signifas: “Sinjoro, kom-



patu nin!“ Tiuj salutvortoj ŝajnis, ke la imperiestro estas dia. Por kristanoj ne estas eble adori homon kiel Dion, por kristanoj nur ekzistas unu “Kyrios“, unu Sinjoro: Jesuo Kristo.

Tial ili salutis Jesuon en siaj diservoj per “Kyrie eleison!“ kaj rifuzis saluti la imperiestron per la samaj vortoj.

Tial multaj kristanoj estis persekutataj kaj murdataj de la romia ŝtato. Ni nomas tiujn viktimojn el ĉiuj epokoj martiroj.

Kial ili salutis Jesuon en diservo? Ĉu li ĉeestis? Jes, ĉar Jesuo promesis: “*Se du aŭ tri kolektiĝas en mia nomo, mi estas meze inter ili*” (Mat 18,20)

Kantante / parolante “Kyrie eleison!“ dum diservo ni kun la martiroj kaj iliaj vortoj vokas kaj salutas Kriston, kiu ĉeestas meze inter ni.

“

Kantante “Kyrie eleison!“
dum diservo ni kun la
martiroj kaj iliaj vortoj
vokas kaj salutas Kriston

La unua kulmino en la diservo / liturgio estas la laŭtlegado de la Sankta Evangelio. La persono, kiu laŭtleagos la evangelion, antaŭe anoncas ĝin, ĉiuj ekstaras kaj kune kantas / diras: “*Gloro estu al vi Sinjoro.*” Post la evangelio ĉiuj kune finas per la vortoj: “Dankon al vi, Sinjoro!” sendepende ĉu laŭtlegis sinjoro aŭ sinjorino, ĉar per tiuj vortoj kaj per la ekstaro ni honoras la ĉeestantan Kriston, nian Sinjoron.

Por diservo / liturgio estas grave, ke ne manku laŭtlegado de la evangelio. Aliajn tekstojn vi senprobleme povas

forlasi, la Evangelion ne, ĉar per la Evangelio Jesuo rekte parolas al vi. Mi klarigu: En la evangelitekstoj Jesuo parolas rekte al homoj kaj ni starigas nin inter tiujn aŭskultantojn kaj aŭdas kun ili, kion Jesuo diras.

Do se ni en la diservo / liturgio citas vortojn de homoj el la Biblio aŭ de kristanoj el aliaj tempoj, ni “starigas“ nin apud ilin kaj kun ili antaŭ Dion.

Per lasta ekzemplo mi finu. La dua kulmino de la diservo estas la Sankta Manĝo / Eŭkaristio. Dum la liturgio, kiu preparas la Sanktan Manĝon ni citas vortojn, kiujn la plej altaj anĝeloj antaŭ la trono de Dio elvokas tage kaj nokte: “*Sankta, sankta, sankta la Eternulo Cebaot...*”(komparu: Jes 6, 3) Ni adoras kun la vortoj de la plej supraj ĉefanĝeloj nian Dion, ĉar ni kun ili staras antaŭ lia trono.

Cetere: Ne la pastoro, kiu celebras la liturgion, sed Jesuo Kristo mem invitas vin al la Sankta Manĝo. La Sankta Manĝo estu por vi komenco de la ĉiela ĝojfesto. Kristo invitas nin al la “tablo de la Sinjoro“ kaj senteble (!) per la pano kaj vino Li estas meze inter ni.

Do, jam nun venu kaj vizitu Dion ofte kaj dum diservo / liturgio antaŭĝoju:

Starigu vin kune kun la sanktuloj el ĉiuj epokoj, tempoj kaj lingvoj antaŭ la tronon de Dio kaj kune glori, preĝu, adoru lin.

Kio hodiaŭ jam komenciĝas, en eterne videble plenumiĝas.

[La aŭtoro de la artikolo, Wolfram Rohloff, Zöblitz, estas pastoro en la Evangelia Luterana Eklezio de Saksio]

Sep ruĝaj soldatoj kantante eniras la ĉielon*

Tradukita de Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Unu el miaj travivaĵoj plej strangaj rilatas al milito. Mi prezentis min al la registaro kaj mi estis komisiita oficiro en la armeo de Generalo Mannerheim. La tempo estis terura. Ni sieĝis la urbon. Ĝi estis kaptita de la Ruĝa Armeo kaj ni rekaptis ĝin. Iuj ruĝaj militkaptitoj estis sub mia gardo. Sep el ili estos mortpafotaj lunde je la sunleviĝo. Mi neniam forgesos la antaŭan dimanĉon. La sep kondamnitaj viroj estis garditaj en la subtera etaĝo de la urbodomo. En la koridoro miaj viroj staris rekte kun siaj fusiloj.

La etoso estis plenplena de malamo. Miaj soldatoj estis kiel ebruloj pro la venko. Ili mokis siajn militkaptitojn, kiuj ege blasfemis kaj batis la murojn per sangantaj pugnoj. Aliaj vokis siajn malproksimajn edzinojn kaj gefilojn. Je la sunleviĝo ĉiuj de ili estos mortigitaj.

Ni posedis la venkon, tio estis certe vera. Sed la valoro de tio ŝajnis malgrandiĝi dum la nokto forpasis. Mi komencis demandi min ĉu malbena eble restas sur la armiloj, ne gravas kiuj utiligas ilin.

Tiam io okazis: unu el la viroj kondamnitaj al la morto komencis kanti! “Li freneziga!” ĉiuj unue pensis. Sed mi antaŭe rimarkis ke ĉi tiu viro, Koskinen, nek furioziĝis nek blasfemis kiel la aliaj.

Trankvile li sidis sur la benko, ... Neniu parolis kun li – ĉiu portis sian ŝarĝon laŭ sia propra maniero. Kaj Koskinen kantis, iom ŝanceliĝe komence, tiam lia voĉo plifortiĝis kaj iĝis natura kaj libera. Ĉiuj militkaptitoj turniĝis kaj rigardis la kantanton kiu nun ŝajnas esti en sia medio:

*Sendanĝera inter la brakoj de Jesuo,
Sendanĝera sur Lia kompatema brusto,
Tie per Lia amo superombrita,
Dolĉe mia animo ripozos.
Aŭskultu, estas la voĉoj de anĝeloj,
Portitaj per kanto al mi
Super la kampoj de gloro,
Super la maro de jasp.*

Koskinen rekantadis tiun version, kaj kiam li ĉesiĝis, ĉiuj silentiĝis dum kelkaj minutoj ĝis frenezspekta individuo ekkriis, “Kie vi trovis tion, stultulo? Ĉu vi intencas fari nin religiaj?”

Koskinen rigardis siajn kamaradojn kaj liaj okuloj pleniĝis per larmoj. Tiam li trankvile demandis: “Kamaradoj, ĉu vi povas aŭskulti min dum nur minuto? Vi demandis min kie mi trovis ĉi tiun kanton. Ĝi venas el la Armeo de Savo. [La Armeo de Savo estas tre fama evangelia eklezio.] Mi aŭdis ĝin tie antaŭ tri semajnoj. Komence ankaŭ mi mokis ĉi tiun kanton, sed finfine ĝi tuŝis min.

* Mi tradukis ĉi tiun artikolon el la angla lingvo. La aŭtoro estas la eminenta inĝeniero Nordenburg kiu batalis en la finnlanda armeo dum la

Vintra Milito kontraŭ la Sovetunio, iomete antaŭ la Dua Mondmilito.

Estas malkuraĝe kaŝi niajn kredojn. La Dio kiun mia patrino kredis nun estas ankaŭ mia Dio. Mi ne povas klarigi al vi kiel tio okazis, sed mi scias ke tio okazis. Mi maldormis hieraŭ nokte kaj subite mi sentis ke mi devas trovi la Savanton kaj kaŝi min en Li. Tiam mi preĝis – kiel la rabisto sur la kruco – por ke Kristo pardonu min, ke Li purigu mian pekoplenan animon, kaj ke Li preparu min por stari antaŭ Li kiun mi baldaŭ renkontos.”

“Estis stranga nokto,” daŭris Koskinen. “Estis momentoj kiam ĉio ŝajnis brili ĉirkaŭ mi. Versoj el la Biblio kaj el la himnaro venis al mia menso. Ili alportis mesaĝon pri krucumita Savanto kaj Lia sango kiu forpurigas la pekon, kaj pri la hejmo kiun Li preparas por ni. Mi dankis Lin, mi akceptis ĝin [tiun mesaĝon], kaj ek de tiam ĉi tiu verso sonadas interne de mi. Ĝi estas la respondo de Dio al mia preĝo. Mi ne povis plu reteni ĝin ĉe mi! Ĝis post kelkaj horoj mi estos ĉe la Sinjoro, savita per Lia graco.”

La vizaĝo de Koskinen brilis kiel per interna lumo. Liaj kamaradoj sidis trankvile. Li staris senmove. Miaj soldatoj aŭskultis tion kion ĉi tiu ruĝa revoluciulo diris.

“Vi pravas, Koskinen,” diris fine unu el liaj kamaradoj. “Se mi nur povus scii ke ekzistas kompato ankaŭ por mi! Sed ĉi tiuj manoj verŝis sangan kaj mi insultis Dion kaj mi surtretis ĉion, kio estas sankta. Nun mi konstatas ke la infero ekzistas kaj ke ĝi estas mia inda loko.”

Li sinkis al la planko kun malespero montrita en sia vizaĝo. “Preĝu por mi, Koskinen,” li ĝemis. “Morgaŭ mi mortos kaj mia animo estos en la manoj de la

diablo.”

Kaj tie ĉi tiuj du ruĝaj soldatoj surgenuiĝis kaj preĝis la unu por la alia. Ĝi ne estis longa preĝo, sed ĝi malfermis la ĉielon por ili ambaŭ. Ni kiuj aŭskultis ĝin forgesis nian malamon. Ĝi [la malamo] fandiĝis antaŭ la lumo de la ĉielo, ĉar ĉi tiuj du viroj kiuj baldaŭ mortos petis pacon ĉe Dio. Pordo al la nevidebleco estis malfermita kaj ni estis ravitaj per la sceno.

Permesu min diri al Vi koncize ke antaŭ la kvara horo de la mateno, ĉiuj kamaradoj de Koskinen sekvis lian ekzemplon kaj ili komencis preĝi. Ne estas eble priskribi la ŝanĝon en la etoso. Iuj el ili sidis sur la planko, aliaj parolis pri spiritaj aferoj.

La nokto preskaŭ malaperis kaj la tago eklumis. Neniu ekdormis eĉ momente. “Kantu la kanton unufoje plu por ni, Koskinen,” petis unu el ili. Se vi estus povinta aŭskulti ilin kantantajn! Ne nur tiu kanto sed versoj kaj rekantaĵoj longe forgesitaj eliris el iliaj memoroj kiel burĝonoj antaŭ la sunbrilo. La soldatoj gardantaj kunigis siajn voĉojn kun ili.

La urba horloĝo sonigis la sesan horon. Mi ege deziris petegi kompaton por ĉi tiuj viroj, sed mi sciis, ke tio ne estis ebla.

Inter du vicoj de soldatoj ili elmarŝis al la ekzekuto. Unu el ili petis permeson kanti unu foje plu la kanton de Koskinen. Permeso estis aprobita. Tiam ili petis morti kun la vizaĝoj malkovritaj – kaj kun la manoj levitaj al ĉielo ili potence kantis:

*Sendanĝera inter la brakoj de Jesuo,
Sendanĝera sur Lia kompatema brusto*

Kiam la lastaj linioj ĉesiĝis, la leŭte-

nanto donis la ordonon, “Pafu!” Kaj la sep ruĝaj soldatoj finis sian lastan batalon. Ni klinis la kapojn por preĝi silente.

Kio okazis en la koroj de la aliaj mi ne scias; sed rilate al mi, mi estas nova

viro ek de tiu horo. Mi renkontis Kriston per unu el Liaj plej humilaj kaj plej junaj disĉiploj, kaj mi vidis sufiĉe por konstati ke ankaŭ mi povus aparteni al Li.

(Noto de la tradukisto)

Nenia religio, nenia religia rito, nenia eklezio donas esperon ĉe la morto. Nur la krucumita, releviĝinta, vivanta Kristo sola donas esperon ĉe la morto. Nenia religio, nenia religia rito, nenia eklezio fandas la malamon. Nur la amo de la vivanta Kristo fandas la malamon.

Du krimuloj estis krucumitaj kun Jesuo Kristo. Unu el ili konfesis sian malbonaĵon kaj fidis je Kristo. La Sinjoro promesis al li:

“Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo” (Luk 23,43).

Kiel tiu pentema krimulo, la sep ruĝaj soldatoj ne havis okazon partopreni religian riton. Ili simple fidis je Kristo; kaj ili ankaŭ foriris por ĉeesti kun Li la saman tagon de sia morto.

La apostolo Paŭlo skribis rilate al ĉiuj kredantoj en Jesuo Kristo:

“Ni do ĉiam ĝoje kuraĝas, kaj ni scias, ke dum ni ĉeestas en la korpo, ni forestas de la Sinjoro (ĉar ni iradas fide, ne vide); ni ĝoje kuraĝas, kaj ni pli volas foresti de la korpo kaj ĉeesti kun la Sinjoro”

(2 Kor 5,6-8).

Jesuo Kristo diris:

“Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos”

(Joh 11,25-26).



Laŭ Doré: La krucumado

Enkonduko historia – pri la soldatoj-imperiestroj

el la enkondukaj ĉapitroj por ANTOLOGIO LATINA 5, dua parto

Gerrit BERVELING, NL

[Antaŭa parto en Dia Regno 3/2012]

bataloj – imperiestriĝoj – bataloj ...

Maksimino la Traco (*Gaius Julius Verus Maximinus Thrax*) fariĝis imperiestro en 235 p. Kr. – En Germanio kaj laŭ la Danubo li atingis brilajn militajn sukcesojn; sed eksplodis pluraj insurekcioj kontraŭ li, apogate de la senato; eble ĉar la impostojn li tre draste altigis por pagi la kampanjojn. La senato precipe subtenis la trupojn en Nord-Afriko, kie en 238 por kelkaj semajnoj oni hurais kiel imperiestrojn kaj Gordianon la 1-an (*Marcus Antonius Gordianus Semprianus Romanus Africanus*, 238) kaj ties samnoman filon Gordianon la 2-an (*Marcus Antonius Gordianus Semprianus Romanus Africanus*).

Kio sekvis, estis duonjarcento da enlanda konfuzo kaj civitanaj militoj. Samjare ankoraŭ ‘regis’ imperiestre ekzemple Pupieno (*Marcus Clodius Pupienus Maximus*) kaj Balbino (*Decimus Caelius Calvinus Balbinus*) kaj Gordiano la 3-a (*Marcus Antonius Gordianus Pius*, 238-244.)

Filipo la Araba (*Marcus Iulius Philippus Arabs*, 244-249) malfermis la 21-an de aprilo 248 la festadon pri la 1000-jara ekzisto de Romo, ekde Romulo kaj Remo en 753 a.Kr., sed lia ĉefa okupo estis defendadi la landlimojn ĉirkaŭ Danubo... Lia 9-jara filo Filipo la 2-a (*Philippus*) fariĝis kun-imperiestro. Hieronimo mencias Filipon la

Araban kiel unuan kristan imperiestron: laŭ li la episkopo de Antioĥio foje devigis lin fari publikan penton antaŭ ol eniri la preĝejon. Ĉu tio vere okazis, ne plene certas.

Decio fariĝis la sekva reganto de la imperio (*Gaius Messius Quintus Traianus Decius*, 249-251). Unue li mortigis ambaŭ Filipojn. Sian filon (*Quintus Herennius Etruscus Messius Decius*) li faris dum kelkaj monatoj kun-Aŭgusto: Herenio Etruska.

Eble ne estas hazardo, ke la sama jaro 250 misfamiĝis kiel la jaro de la *unua ĝenerala* persekutado de Kristanismo: eble la Dioj de Romo estos kontentaj, se ree ili solaj estos rekonataj? Pri tio poste.

Ĉirkaŭ 250 estis la pleja mizero: nenombreblaj homamasoj superrundas Malgrand-Azion, la Danuban regionon, Italion, Hispanion kaj Gaŭlion (nun unuafoje ni aŭdas pri la Frankoj, kiuj poste fariĝos grava potenco.). Ne havas sencon provi ekzakte kalkuli la imperiestrojn. Laŭdire, en unu jaro foje eĉ estis 35! Estis epoko de ekstrema kruelo.

Ĉirkaŭ 270-275 akiris militajn sukcesojn Klaŭdio la 2-a (*Marcus Aurelius Valerius Claudius*, 268-270) kaj Aŭreliano (*Lucius Domitius Aurelianus*, 270-275). La laste menciita imperiestro provizis Romon per la remparoj, kiuj ĝin karakterizis dum la tuta Mezepoko. Ekestis la momento pensi pri iom da rekonstruo.

du Romiaj Imperioj

Ne nur la menciitaj homamasaj migradoj estis *la* kialo, ke finfine disfalis la malnova Romia Imperio: estis multe pli ol nur sociaj-politikaj aferoj. Entute estis tiel multe da interplektitaj kaŭzoj, ke ĉiu simpla klarigo tro malfortas.

Depost la 3-a jc en Okcidenta Eŭropo oni reformis la strukturojn kaj faris 4 grandajn provincojn; Nord-Afriko same fariĝis 4 provincoj; la Oriento (Ateno–Aleksandrio) dividiĝis en 25 provincojn. Tio montras la relativan gravecon-logatecon de la regionoj.

La Romia Imperio ja estigis makro-ekonomiajn jur- kaj regado-sistemojn, sed homforte kaj kulturflanke Romo fakte estis malsupera.

En Oriento la Romianoj konfrontiĝis kun ege kompakta homamasoj: la popoloj de Ateno ĝis Persio kaj Egiptio povis fieri pri kulturoj multe pli aĝaj kaj multe pli rafinitaj ol tiu de Romo. Multaj Romanoj forlasis la proprajn Diojn kaj Diinojn kaj vojperdiĝis en la labirinto de filozofioj de Greka-Helenismaj, Siriaj, Persaj civilizoj. La Romia Imperio ja estigis makro-ekonomiajn jur- kaj regado-sistemojn, sed homforte kaj kulturflanke Romo fakte estis malsupera.

Fine de la 3-a jc oni faris el tio la konkludon:

Diokleciano (*Gaius Aurelius Valerius Diocletianus*, naskita kiel *Dioklo*, regis 284-305) venkis la ĥaoson de la 3-a jc, li metis la fundamentojn por nova futuro. Devene el Ilirio (pli malpli identa je la

eksa Jugoslavio), li sin montris granda organizanto, kun fera volo. Li ekloĝis en Nikomedio (nuna Turkio) kiel nova ĉefurbo. Ĉe li komenciĝas *absolutismo*; la senato ne plu havas signifon.

Du aferojn li klopodis reorganizi: konsiderante la Roman Imperion tro granda por vere efika regado, li dividis ĝin en du ĉef-partojn: Orientan kun ĉefe Greka kulturo, kaj Okcidentan kun ĉefe Latina kulturo. Ambaŭ Romiaj Imperioj ekhavis propran imperiestron kun la titolo *Aŭgusto*; samtempe, por certigi la estontecon, al ambaŭ Aŭgustoj tute sisteme li jam atribuis posteulon kun la titolo *Cezaro*. Post *antaŭe* difinita nombro da jaroj, la Aŭgustoj abdikis kaj la Cezaroj fariĝu anstataŭe Aŭgustoj, kaj mem tuj alelektu novajn Cezarojn por postsekvi ilin post denova periodo. Kompreneble, la sistemo estis tro ideala por ke ĝi vere povis funkcii kontentige; tamen ĝi iomete helpis bremsi la ĥaoson.

Samtempe Diokleciano ŝanĝis la ekonomian sistemon; enkondukis kontroladon pri prezaltiĝoj kaj distriktojn por pagado de impostoj. Ankaŭ en spirita-religia senco li intencis konstrui unuecon; tial ĉiuj homoj senescepte kultadu la Dian Imperiestron sub la titolo *Dio kaj Sinjoro*. Por multaj tio ne estis akceptebla. La Judan popolon – la sola popolo, pri kiu oni sciis, ke ĝi adoras nur unu Dion, kaj transiri de unu al du Dioj estas paŝo nemezureble pli granda ol transiro de x^* al x -plus-unu Dioj – oni ekskludis el tiu ĉi adoro-devo, sed persekutado de kristanoj estis rezulto neevitebla. Tio daŭris 10 jarojn. Ĝi estis

* Tie ĉi la x signifas nekonatan nombron, sufiĉe grandan.

la plej grandskala de l' tuta klasika periodo. Ĝi tamen estis malpli akra en okcidento, ĉar en la Okcidenta Romia Imperio estis Cezaro moderema, Konstancio Ĥloro (*Constantius Chlorus*), la patro de Konstantino la Granda.

Laŭ antaŭe fiksita dato, en 305 p.Kr. Diokleciano abdikis, kaj retiriĝis al sia giganta palaco en Spalato (*Split*). Li ankoraŭ ĝisvivis la plenan kolapson de sia postsekvada sistemo; li mortis en 313.

post Diokleciano

Post akregaj bataladoj en 306 sin montris la plej forta en Okcidento Konstantino la Granda (*Flavius Valerius Aurelius Constantinus*). En 312, en la fama batalo ĉe la *Milvia Ponto* (en Romo), li definitive seniĝis de ĉiuj siaj rivaloj. Laŭ la legendo, aperaĵo de Kruco en la aero konvinkis lin elekti la 'ĝustan Dian protekton', nome tiun de Kristo. Antaŭe Konstantino estis kultanto i.a. de Apolono, Mitrao kaj Kristo. La vizio, oni diras, estis decidiga. Licinio, Aŭgusto de la Orienta Romia Imperio (308-324), kun siaj trupoj iris al Milano, kie li edziĝis al fratino de Konstantino, Konstancia.

La jaro 313 fariĝis kvazaŭ simbola: Licinio kaj Konstantino promulgis la *Edikton de Milano*: tiu leĝigis, ke depon nun ĉiuj senescepte civitanoj de la Romia Imperio havu la plenan liberecon mem elekti sian religion: tio finis la persekutadon de kristanoj. Licinio iniciatis la edikton, sed poste oni atribuis ĝian meriton al Konstantino, kiu el ilia interbatalado fariĝis fine la postvivanta venkinto. Konstantino donacis al la papo de

Romo la Lateranan Palacon kiel rezidejon. En Oriento ie tie oni malgraŭ la edikto tamen plu persekutis kristanojn.

Nur en 324 Konstantino fariĝis solreganto de la orienta kaj okcidenta partoj de l' Imperio. La persekutadon kontraŭ kristanoj li komplete ĉesigis.

Nur en 324 Konstantino fariĝis solreganto de la orienta kaj okcidenta partoj de l' Imperio. La persekutadon kontraŭ kristanoj li komplete ĉesigis. En oriento li fondis novan ĉefurbon: Konstantinopolo. Por fini la inter-kristanajn kverelojn li kunvokis kaj prezidis – neaptita! – la koncilion de Niceo en 325 p.Kr. Ekde 330 li plene nur rezidis en la ne-pagana nova ĉefurbo, Konstantinopolo.

Nur sur sia mortolito li igis sin bapti: 337 p.Kr.

dinastio de Konstantino

Liaj filoj, Konstantino la 2-a (*Flavius Claudius Constantinus*), 337-340, Konstanto (*Flavius Iulius Constans*), 337-350, kaj Konstancio (*Flavius Julius Constantius*), 337-361, inter si akre batalis pri la potenco. Ilia kuzo, Juliano (*Flavius Claudius Julianus*), kiu poste fariĝis imperiestro (360-363) provis ankoraŭ 'savi' la seriozan flankon de paganismo, sed kiam en 363 li batalpereis kontraŭ la Persoj, Kristanismo klare estis la venkinta religio de l' Imperio.

Joviano (*Flavius Jovianus*, 363-364), kiun la trupoj elektis imperiestro, devis retiriĝi el Persa (Parta) teritorio; li eĉ Romon ne atingis – post 8-monata ‘regado’ li mortis en Bitinio (nuna Turkio), verŝajne venenita pere de fungoj.

Valentiniano kaj Valento (*Flavius Valentinianus*, 364-375 & *Flavius Iulius Valens*, 364-378), du fratoj el Panonio, ree ordigis la regnon. La disduigon de Diokleciano ili ree enkondukis; Kristanismo denove estis nepersekutinda.

dinastio de Teodozio

Sekvis Valenton Teodozio el Hispanio (*Flavius Theodosius*, 378-395). Dum lia regado Kristanismo estis proklamita

oficiala religio de la Imperio. Nun ĉiuj ne-kristanoj estis malavantaĝaj; unua-vice la Judoj, sed fariĝis malfacile ankaŭ por pluraj kristanaj sektoj. Ankaŭ multajn templojn oni fermis. La Orakolo de Delfo estis malfondita.

En 394 Teodozio estris ambaŭ orientan kaj okcidentan partojn. Sed post lia morto la Romia Regno *definitive* disfalis. Lia pliaĝa filo Arkadio (*Flavius Arcadius*) transprenis la potencon en la Orienta Romia Imperio, lia plijuna filo Honorio (*Flavius Honorius*) en la Okcidenta Romia Imperio.

Kio postrestis el la malnovaj religioj, retiriĝis grandparte en la vilaĝojn (Latine *pagi*; de tio la vorto *pagano*).

œ

Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan Jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno

deziras
la sekretario & distribuanto
kaj la redaktoro

Pavel Polnický & Bengt Olof Åradsson



KELI-kongreso 2013

Neforgesu aliĝi ...

la plej malaltaj prezoj validas ĝis 31.12.2012

SVITAVY – distrikta urbo kun 17 000 loĝantoj, kuŝanta 435 m super la maro, estas jam sufiĉe konata al esperantistoj pro sia Esperanto-muzeo. En lastaj jaroj estis tie organizitaj kelkaj internaciaj E-aranĝoj kaj venontjare okazos tie plia – 63-a KELI kongreso. Historia urbo, unufoje skribe menciita en la jaro 1200 kaj ĝia ĉirkaŭaĵo proponas al Vi multajn interesajojn.

Aliĝilon vi trovas en Dia Regno nr 5 aŭ ĉe nia TTT-paĝo: keli.chez.com

Temo de la kongreso * AKVO * estas tre vastsignifa kaj certe Vi aŭdos tre riĉajn prelegojn, kiuj instigos diskutojn. Variaj estos programoj kulturaj kaj ekskursaj....

Pavel Polnický

I-a listo de aliĝintoj:

- | | |
|--------------------------------|------|
| 1. Stamm Sieglinde | - AT |
| 2. Hamajdová Jaroslava | - CZ |
| 3. Oláh Margit Judit | - RO |
| 4. Popoviciu Eugenia Ecaterina | - RO |
| 5. Farkas Antal | - RO |
| 6. Polnický Pavel | - CZ |



Akvo – viva akvo – fluanta akvo – sopirata akvo

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Akvo! Kio estas kaj kion ĝi signifas por ni? La temo por nia kongreso en 2013 estas “Akvo”. El kiu vidpunkto ni rigardu la “Akvon”?

Ni legas plurloke en la Biblio pri akvo, ekz pri Moseo (Nom 20,11-13):

11 Kaj Moseo levis sian manon kaj frapis la rokon per sia bastono du fojojn; kaj ekfluis multe da akvo, kaj trinkis la komunumo kaj ĝiaj brutoj. 12 Tiam la Eternulo diris al Moseo kaj al Aaron: Pro tio, ke vi ne kredis je Mi, por montri Min sankta en la okuloj de la Izraelidoj, tial vi ne venigos ĉi tiun komunumon en la landon, kiun Mi donas al ili. 13 Tio estas la Akvo de Malpaco, ĉe kiu la Izraelidoj malpaci kontraŭ la Eternulo kaj per kiu Li montris Sin sankta al ili.

Aŭ la versikloj kiam Jesuo diras ke tiu kiu soifas venu al Li (Joh 7,37-38):

37 En la lasta tago, la granda tago de la festo, Jesuo staris kaj kriis, dirante: Se iu soifas, tiu venu al mi kaj trinku. 38 Kiu kredas al mi, kiel la Skribo diris, el ties ventro fluos riveroj da viva akvo.

Por mi unu el la plej interesaj tekstoj troviĝas en Joh 4,7-10:

7 Venis virino Samaria, por ĉerpi akvon; Jesuo diris al ŝi: Donu al mi trinki. 8 Ĉar liaj disĉiploj jam foriris en la urbon, por aĉeti nutraĵojn. 9 La Samarianino do diris al li: Kiel vi, estante Judo, petas trinki de mi, kiu estas Samarianino? (Ĉar la Judoj ne

interrilatas kun la Samarianoj.) 10 Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Se vi scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon.

Tiu teksto por mi enhavas plurajn pensigajn partojn, ekz: 1) la viva akvo kiun Jesuo donas al petantoj 2) Jesuo parolas kun virino, krome ŝi venas el Samaria, do la teksto ankaŭ temas pri niaj rilatoj kun aliuloj/fremduloj/kunuloj 3) la akvo ne estas nacia sed senlima k.t.p.

Tiu ĉi lasta ekzemplo enhavas kaj religian kaj socian kaj politikan vidpunktojn. Eblas aldoni kemian kaj biologian vidpunktojn al la unuaj.

Do mi supozas ke la temo donas al la kongresaj prelegontoj eblecojn pritrakti la temon el multaj vidpunktoj.

Sed mi volas fini per eble unu el la plej famaj tekstaj bildoj – tiu pri la sopiranta cervo (Psa 42,1b):

*Kiel cervo sopiras al fluanta akvo,
Tiel mia animo sopiras al Vi, ho Dio.*

☪



Sankta Paŭlo bezonas komparojn kaj... sin kompromitas!

Armando ZECCHIN, IT

Sankta Paŭlo kutimas apogi kaj ilustrati siajn ideojn – nome fundamentaj ideoj de kristanismo – sur komparoj eksplicitaj kaj implicitaj. Kelkaj provis ilin kolekti kaj listigi kaj malkovri la literaturan originojn aŭ iliajn originalecon. Al ni, nun, interesas la sekva.

Paŭlo estas ĉiam asertanta la unuan rangecon kaj centrecon de Kristo. Bone, tre bone! Kaj, rilate Kriston, kiu estas la Eklezio? Kiel ĝi rilatas al sia originanto? Paŭlo scias tre bone kio estas la Eklezio rilate Kriston: Ĝi devas stampiĝi sur Li kaj obei al Li! Tion li asertas firme kaj aŭtoritatece kaj konstante. Tion li asertas ankaŭ en (Efe 5,21-33). La instruo estas klara, klarega kaj tia klarego sufiĉus...

La ideo klaregas sed al lia ardo mankas... komparo.

Atentu, Paŭlo. Vi riskas krei per viaj manoj insidon: la komparoj ne ĉiam marŝas milpiede kaj la komparo povus gluigi al vi misreputacion laŭeterne kaj eĉ pliposte. Paŭlo, rezignu!

Nenio, nenimaniere! Li insistas kaj ... sinfrape pafas:(sintezo) *“La Eklezio devas obei al Kristo kiel la edzino devas obei al sia edzo”*. Jen liaj precizaj vortoj: *”submetiĝante unu al alia en la timo al Kristo. 22 Edzinoj, submetiĝu al viaj edzoj tiel same, kiel al la Sinjoro. 23 Ĉar edzo estas kapo de edzino, kiel ankaŭ Kristo estas kapo de la eklezio; kaj li estas la savanto de la korpo. 24 Sed kiel*

la eklezio sin submetas al Kristo, tiel ankaŭ edzinoj al edzoj en ĉio. 25 Edzoj, amu viajn edzinojn, kiel Kristo amis la eklezion kaj pro ĝi sin donis, 26 por ke li sanktigu ĝin per akvolavo, kun la vorto... “ (Efe 5).

Oh, Paŭlo! Ekde nun ĝis eterne kaj ankaŭ pliposte, vi estos kulpigita pri kontraŭvirinismo, kontraŭfeminismo, mizoginismo, masklismo... Kaj kun vi, en tiun elpensitan honton, vi kunportos la tutan Eklezion!

Vere, je via senkulpigo, tiam tiu komparo ne skandalis, ĉar la virino “ne estis sentita egalrajta al la viro”, sed leĝo kaj moroj ŝanĝiĝas kiel (tion ankaŭ vi rimarkigis, kelkloke) la pedagogieco de la Malnova Testamento: viro kaj virino, jam definitive, egalrajtas antaŭ la leĝo ĉiukaze”. Ĉu vi ne antaŭvidis tion?

Aŭskultu, amiko Paŭlo: aplikante vian komparon laŭ la moderna vidpunkto rezultus ke la Eklezio estas ĉiuspekte egalvalora al Kristo: ke li, do, ne sin permesu ordoni aŭ pretendi la lastan vorton! Li estus masklisto! Mi vin admonis ke la komparoj semas malbonaĵojn...

“Ho, amiko mia, la komparo – sin defendas Paŭlo - estas instrumento por ilustrati la veron, ne la veron mem! La komparo suferas la trivadon de la tempo, la komparato (ĉi-kaze: la Eklezio devas obei al Kristo) persistas! Cetere mi jam skribis ke ne plu “ekzistas viro kaj

virino”. Vidu la tutan frazaron de la ĉapitro 3 de la epistolo al la Galatoj: “27 *Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. 28 Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo. 29 Se do vi apartenas al Kristo, vere vi estas la idaro de Abraham, kaj heredantoj laŭ la promeso*”.

“Ĉu mi estas malŝatita mizogino, kontraŭvirina kontraŭprogresulo? Tia akuzo eblas nur ĝis kiam oni volu kompreni ke mi petis servon al komparo kiu, galeote kaj providence, transformiĝis ĝuste laŭ la implicitaj sekvoj de miaj supre cititaj letereroj al la Galatoj”.

☞



Testamento

Julia SIGMOND, RO/IT

Ĉu ekzistas lando, kie post certa aĝo estas deviga skribi la testamenton? Mi ne scias. Kvankam laŭ mi estus bona ideo. Unu el miaj seninfanaj amikinoj rakontis al mi, ke ŝi kun sia edzo decidis skribi la testamenton atinginte la 50 jaraĝon. Ili ambaŭ lasis ĉion por la alia, sed se ili mortus kune, samtempe, ekzemple en aŭtomobil-akcidento, ili lasis ĉion al nevino, kiu regule vizitis kaj helpis ilin.

Ĉiutage mi rememoras pri mia bona kaj estimata najbaro. Mi ne scias, ĉu li skribis aŭ ne testamenton. Certe li lasis ĉion al sia edzino kiu, bedaŭrinde, subite mortis post li.

Tagon, preterirante la najbaran domon, kie ili loĝis, konsterniĝinte mi ekvidis grandan ŝarĝaŭtomobilon. Unu laboristo portis el la domo per ĉarumeto diversajn objektojn, librojn, manlaboraĵojn, kuirvazojn, mastrum-artikolojn. Li ĵetis supren al la alia laboristo, kiu provis metadi ilin, ke ĉion oni povu

forporti. Mi ekstaris kun enradikiĝintaj piedoj, kvazaŭ esplorante, kiam mi vidis, kiel ili ĵetas la valorajn aĵojn, preskaŭ balaĵojn. El unu skatolo la laboristo supre laboranta elprenis iun neĝblankan, tute novan centrifugilon kaj kun granda scivolemo li esploris ĝin. Videble, neniam li vidis ĝis nun similan objekton. Min rimarkinte, li demandis min: ”Por kio ĝi estas bona, sinjorino?” Mi ne povis ekparoli kaj respondi, kaj forlasis lin.

Jaroj pasis de tiam, sed ankaŭ nun, preterirante tiun domon, mi vidas pense la ŝarĝaŭtomobilon plena de valorajoj. Ekde tiam al multaj homoj mi konsilis: “Se vi havas iun valoran aĵon, aŭ senvaloran sed karan objekton, pensu ĝustatempe, al kiu vi dezirus testamenti, ke ĝi ne atingu la rubejon, sed iĝu donaco de iu persono, kiu – rigardante ĝin – rememoros vin kun sincera amo.

☞

Invito al novaj ekumenaj

BIBLIAJ TAGOJ kun Adoru 2013!

la 13a ĝis 17a de marto 2013

Strasburgo

Ili okazos en la Kultura Centro S-ta Tomaso (de Akvino), en la eŭropa urbo Strasburgo (Centre Culturel Saint Thomas, 2 rue de la Carpe Haute, 67000 Strasbourg. Tel. 03 88 31 19 14)

Strasburgo estas sufiĉe centra urbo, el multaj vidpunktoj: geografia, trafika, politika, historia kaj eĉ ekumena. Ĝi estas atingebla komforte per aŭto, trajno kaj aviadilo.

Kion ni faros?

- Ni aŭskultos kaj diskutos pri tekstoj el la Biblio
- Ni kantos kantojn, el Adoru, kaj aliajn
- Ni ofertas diversajn preĝtempojn laŭ diversaj tradicioj: matenaj kaj vesperaj preĝoj kaj laŭdoj, katolikaj sanktaj mesoj, k.a. Tiel ni praktikos el la riĉeco de Adoru. (Kompreneble ĉiu povas partopreni kion kaj kiom li deziras!)
- Ni ekskursos al la urbocentro
- Ni havos sufiĉe da okazo ĝui amikan internacian Esperanto-etoson dum manĝoj, libera tempo, kaj...

Kiom kostos la restado?

Mi antaŭmendis por 30 personoj, 18 litojn en dulitaj ĉambroj kaj 12 litojn en individuaj ĉambroj. Ju pli frue vi mendos, des pli certe mi povas garantii al vi la deziratan ĉambron! Tranoktado en dulita ĉambro kun kunulo kostas 26 € po persono kaj nokto. Se vi bezonas individuan ĉambron, tiu kostas 32 € po persono kaj nokto. En tiu prezo, littukoj estas inkluzivaj, kaj ankaŭ la respektiva matenmanĝo.

Tagmanĝo kostas 12,50 €, vespermanĝo: 10,-€. Tio signifas sume: $(26+12,50+10)€$, x 4 tagnoktoj=194 €, aŭ $(32+12,50+10) €$, x 4 tagnoktoj=218 €.

Estas ebleco por paŭza trinkaĵo matene (kafo/teo/lakto), kiu kromkostas 1 € por fojo, kaj posttagmeza manĝaĵo de seka kuko kun kafo/teo/lakto/oranĝosuko/akvo, kiu kromkostas 2 €. Mi proponas tiun paŭzan trinkaĵon en ĵaŭdo, vendredo kaj sabato, kaj la paŭzan manĝaĵeton en vendredo (en la aliaj du posttagmezoj, ni ekskursos).

Tamen vi devas antaŭmendi tiujn paŭzaĵojn, kaj per tio altiĝos via pagenda sumo, do en la proponita kazo je 5 €.

Eblas ankaŭ partatempa partopreno, sed kompreneble ni ĝojas, se vi povas dividi la tutan tempon kun ni!

Aliĝo

Via aliĝo (kaj antaŭmendo de ĉambro) ekvalidos per la alsendo de la necesaj informoj (vidu malsupre) kaj antaŭpago (por organizaj kostoj, do ne por la domo!) de 30 € (orient-eŭropanoj: 15 €) al mia konto: 6242548500, ĉe Volksbank Hellweg e.G., BLZ 41460116. IBAN: DE25 4146 0116 6242 5485 00, BIC: GENODEM1SOE.

Ne forgesu la indikon: "BIBLIAJ TAGOJ 2013".

Se estas iuj problemoj aŭ demandoj, ne hezitu kontakti min rekte, ĉu letere, ĉu rete!
Esperante baldaŭan revidon, via

Stefan Lepping

Mellinstr.5

DE-59457 Werl, Germanio

Retadreso: stefanlepping@gmx.de

Telefono: (+49) (0)2922/9287098.

resp. (0)174/6165428 (bv. telefoni nur en urĝaj kazoj).

Bonvolu (rete aŭ poŝte) sendi al mi ĉi tiun paperon (resp., rete, ties informojn):

Mi aliĝas al ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ kun Adoru 2013!

Familia Nomo:

Persona Nomo:.....

Adreso:

Lando: Retadreso:

Telefono: Konfesio:..... Naskiĝdato:.....

Faru krucetojn:

Mi mendas :

individuan ĉambron por 32 €/ nokto:

en **dulita** ĉambro por: 26 €/ nokto

Prefere kun:

Mi mendas maten-paŭzan trinkaĵon:

Ĵaŭdon Vendredon Sabaton

Mi mendas posttagmez-paŭzan manĝaĵeton:

Vendrede

Aŭ:

Aliaj rimarkoj/ demandoj:

Mi havas kaj kunportos: Biblion Adoru-n

Membrigo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

Kotizoj de KELI 2013

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ›Espero Katolika‹ pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni ›Dia Regno‹ pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, kaj menciu:
por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Svedio: 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
Per via konto ĉe UEA kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
☎ +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Membrigo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

Britio:	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
“Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ jean@bisset100.freeserve.co.uk

- Bulgario** *)
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva
 Stoyanova
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna
 ☎ + 359 52 639628,
 ✉ ivanka_esperanto@abv.bg
- Ĉeĥa Respubliko** 250 CZK
Slovaka Respubliko *)
 Peranto: Pavel Polnický, Na Vinici
 110/10. CZ 29 001 Poděbrady II,
 ☎ +311 241 406,
 ✉ polnicky@quick.cz
- Estonio** *)
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
 EE-10502 Tallin,
 ✉ endel.ojasild@gmail.com
- Finnlando** 30 EUR
 Banka konto Sampo n-ro
 800027-4306 454 "Suomen
 Kristallinen Esperantoliitto".
 Kasistino: [pro la subita morto de la
 kasistino, ni atendas decidon pri
 nova funkciulo]
- Francio** 25 EUR
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
 "Franca Evangelia Esperanto-Ligo
 (FEEL)". Kasisto: Samuel Gaillard
 5 rue Maurice Ravel,
 FR-63800 Courmon d'Auvergne
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
 ✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr
- Germanio** 24 EUR
 Evang. Darlehnsgenossenschaft
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
 "Esperanto-Liga für Christen in
 Deutschland e.V."
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-
 Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
 ☎ 02573 / 626,
 ✉ hetifisch@googlemail.com
- Hungario** *)
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
 ☎ 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Korea Respubliko** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Nederlando** 20 EUR
 (por membroj de KUNE +5 EUR)
 Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75
 "Chr. Esperanto Verg. KUNE"
 Kasistino: Gerda Dercks,
 Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
 ☎ +31(0)546 819 403,
 ✉ gcamdercks@home.nl
- Pollando** 30 PLN
Rumanio *)
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
 ☎ 062 426182,
 ✉ laszlo_maria@yahoo.com
- Rusio** *)
 Peranto: Viktor Gromov,
 ulica Cheluskina, dom 42, kv 56
 420 037 KAZAN r. Tatarstan,
- Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa
 Respubliko) *)
- Svedio** 250 SEK
 Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0
 "Kristliga Esperantoförbundet"
 Kasisto: Bengt Olof Åradsson,
 Västergårdsg 15; S-256 64
 Helsingborg; Svedio
 ☎ +46 (70) 2004574;
 ✉ dr_board@yahoo.se
- Svislando** 20 EUR
 Pagu al la svislanda UEA-konto
 (vidu supre)
- Usono** 30 USD
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton
 al la peranto: Jerald T. Veit, 3578
 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
 ✉ jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

Nova versio de “Ĉe l’ Kristofesto ĝojas ni” (Ellen Gregory)

Baldaŭ venos Kristnasko, jen nova rimedo por prikanti ĝin. Mi ĵus aranĝis (kaj prirefrenis) la malnovan originalan Esperantan Kristnaskan kanton “Ĉe l’ Kristofesto ĝojas ni“. La melodioj proponitaj por ĝi en HIMNARO ESPERANTA, ADORU KANTANTE kaj ADORU neniam allogis min, kaj lastatempe trovinte en la himnaro de la nordamerikaj Sepatagaj Adventistoj, kun la teksto de Isaac Watts “Lo, what a glorious sight appears”, melodion intime ligitan al la malnova angla kanto “La Sep Ĝojoj de Maria” (trad. Auld), mi provis ĝin, ĝuis, kreis refrenon, kaj jen...

[http://miahimnareto.wordpress.com/2011/10/26/nova-versio-de-ce-l-kristofesto-
gojas-ni-ellen-gregory/](http://miahimnareto.wordpress.com/2011/10/26/nova-versio-de-ce-l-kristofesto-gojas-ni-ellen-gregory/)

ROS’ Haruo


Informo pri libro

Ĵus aperis ĉe FONTO:

La Bona Mesaĝo de Jesuo; la kvar Evangelioj; La Nova Testamento, 2a volumo.

Tradukis el la Greka originalo Gerrit Berveling – reviziita unuvoluma reeldono de la kvar libretoj el 1992.

Gerrit Berveling
Kalverstraat 8-B
NL-8011 LH Zwolle Nederlando,
Tel. +31 (0)38-4237003



Gerrit Berveling
Fotis Ziko van Dijk (Vikipedio)

Leŝero alvenis al la sekretario

Samideano Pavel, mi salutas vin en la nomo de Jesuo, mi ĝojas ricevi vian pozitivan respondon pri mia bezono.

Jen do pri mia vivo. Mi naskiĝis en la jaro 1970 en la urbeto Bunda kiel la sesa infano en mia familio kiu konsistas el 9 gefiloj. Mi ekvizitis la elementan lernejon en 1981 kaj en 1987 mi finlernis en elementa lernejo. Mi povus daŭrigi la studon en mezgrada lernejo sed pro la malriĉeco de miaj gepatroj mankis mono por pagi por mia studo kaj tiel mi devis resti hejme kaj ekhelpi al mia patrino.

Mia patro estis blindulo de la jaro 1972 kaj tiel mia patrino devis zorgi pri la ĉiuj laboroj ĉe nia hejmo. Do la vivo estis tiel malfacila. En la loĝloko kie ni vivis tiam ekzistis orminejo kaj ĉar mi ne povis daŭrigi la studadon mi devis iri tien kaj ekfosi oron kaj per la moneto mi ekhelpis mian patrinon por la hejmbezonoj. En 1992 mi decidis edziĝi ĉar mi vidis mian patrinon suferantan pro la pezaj laboroj dum miaj malpli aĝaj fratinoj estis en la lernejo.

En la sama jaro mi renkontis Esperantan lernolibron kaj tre interesiĝis kaj eklernis la lingvon memstare. Tio okazis ĉar mi tre ŝatas edukon. Daŭrigante la lernadon mi fondis

Esperantan grupon nomata *kangetutja*. En 1998 pluvegis kaj atakis nin El-Nino kaj inundigis nian domon kaj ni devis translokiĝi en la nuna urbeto Bunda kie mi loĝas kun mia familio. Mi havas edzinon kaj kvar gefilojn. La pli aĝa havas 14 jarojn, la dua havas 12 jarojn, la tria havas 10 jarojn kaj la lasta havas 8 jarojn kaj estas en la dua klaso en elementa lernejo.

Mi kristaniĝis en la jaro 1996 en pentekosta preĝejo kaj post naŭ jaroj mi studis teologion perkorespondaj kursoj el Usono kaj ricevis diplomon. Nun mi gvidas la eklezion nomata Zion Gospel Assembly kaj jam havas 40 membrojn. Tamen ili malriĉe vivas kaj mi devas helpi kelkajn inter ili. Mallonge tio estas mia vivo.

Mi ne posedas propran komputilon kaj tiel devas mi pagi por la reto, do bonvolu sendi la gazeton perpoŝte. Elektronike mi bezonus multe da mono por legi la gazetojn. Do jen mia poŝt-adreso S-RO DISMAS ROBERT, p.o. BOX 354 BUNDA-MARA TANZANIA. El kiu lando vi venas? Bonvolu ankaŭ skribi al mi iom pri vi..

Korajn salutojn de Dismas Robert.



Pretigu serioze

MIT ERNST, O MENSCHENKINDER



1. Pre - ti - gu se - ri - o - ze
A - pe - ros gran - di - o - ze

la ko - rojn vi en vi.
Je - su', la sav' de Di',

he - ro' el Di - a glor',

de l' Pa - tro pro - me - si - ta,

por lum' kaj viv' do - ni - ta

el gra - co kaj fa - vor'.

MIT ERNST, O MENSCHENKINDER • EG 10, RG 364, EM 143, kp. GL 113
• M (Von Gott will ich nicht lassen): Lyon 1557, religie: Erfurt 1563 • germana
T: Valentin Thilo 1642 • E: Albrecht Kronenberger 2012-10-07

2-a strofo: kp. Jes 62,10; 40,3-4

2. La korojn sen prokrasto
preparu al Jesu',
al via granda gasto.
Ne restu ŝtonoj plu.
Pretigu vin kun ĝoj'.
La montojn malaltigu,
la valojn ebenigu,
ke glatu Lia voj'.

3. Humilo kaj modero
valoras antaŭ Di'.
Aplombo kaj fiero
kondukas al neni'.
Obea justa kor'
orgojlon abomenos,
kaj pretos, kiam venos
Jesuo, la Sinjor'.

4. Jesuo, min pretigu
Vi mem, per bon' kaj ben'.
Advente apertigu
Vi min por Via ven'.
Eniru do en min
de l' stalo kaj de l' kripo,
kaj koro, lango, lipo
eterne dankos Vin.